

人として生まれて

Naskiĝinte kiel homo

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

生きていくのが辛い、と覚る事が誰にでもあります。悩み多き人生です。悩みのない人はおそらくいないでしょう。

犬や猫は覚ることもなく悩みもしません。彼らを羨ましいと覚るかもしれないませんが、彼らはほんとうに幸せだといえるでしょうか。

少なからぬ人々は悩みを忘れよう、あるいは悩みから逃れようとしします。その挙げ句に、アルコール依存になったり、享樂的生活に走ったりします。これが問題の解決にならないことはいうまでもありません。

「苦悩は人生のエネルギーだ」と聞いたことがあります。苦悩とは煩悩に他ならないわけですが、「煩悩即菩提」といわれるように、菩提（悟り）とは煩悩の解決なのですから、煩悩がなければ悟りもありえません。したがって犬や猫には悟りはありません。私たち人間だけが覚ることができします。

恵心僧都（源信）は『横川法語』に次の言葉を書き残しています。

「それ、一切衆生、三悪道をのがれて、人間に生まるる事、大なるよろこびなり。身はいやしくとも畜生におと

Preskaŭ ĉiuj homoj iam sentis aŭ nun sentas, ke vivi estas malfacile. Nia vivo ja estas plena de ĉagrenoj. Neniu vivas sen aflikto.

Hundoj kaj katoj ne pensas, nek afliktiĝas. Eble envias ilin. Sed ĉu ili estas vere feliĉaj?

Ne malmultaj homoj provas forgesi siajn ĉagrenojn aŭ forkuri de ili. En ekstrema kazo iuj enfalas en alkoholismon, aŭ dronas en plezura vivo. Tio ne povas solvi la problemon, kompreneble.

Mi iam aŭdis, “Aflikto estas la energio por la vivo.” Aflikto estas nenio alia ol kleŝo laŭ budhisma vidpunkto. Budhismo instruas, ke kleŝo kaj bodio faras du flankojn de unu afero. Ĉar bodio estas la solvo al kleŝo, ne povas ekzisti bodio aŭ iluminiĝo sen kleŝo. Tial hundoj kaj katoj ne povas iluminiĝi. Nur homoj povas iluminiĝi.

Eŝin (Genŝin) skribis en sia eseeto (*Dharmaj vortoj ĉe Yokawa*) jene:

“Estas ja granda ĝojo, ke vivestaĵoj naskiĝis kiel homoj, ne en la tri malbonaj sferoj. Eĉ se ili estas malaltrangaj, ili superas bestojn. Eĉ se ili estas malriĉaj, ili superas malsatajn spiritojn. Eĉ se ilia espero ne realiĝas,

らんや、家まずしくとも餓鬼にはまざるべし。心におもうことかなわずとも、地獄の苦しみにはくらぶべからず。世のすみうきはいうたよりなり。人かずならぬ身のいやしきは、菩提をねがうしるべなり。このゆえに、人間に生まるる事をよろこぶべし。」

人として生まれた、ということはいへんな出来事です。「盲亀浮木の譬」という話があります。人として生まれてくる確率は、喩えていえば、大海中に棲み、百年に一度だけ水面に浮かび上がる目の見えない亀が、漂っている浮木のたった一つの穴にたまたま頭を突っ込む確率と同じくらいに珍しいことだ、ということです（雑阿含経巻十六）。三帰依文でも「人身受け難し、今すでに受く」といいます。

仏教では六道輪廻を説き、人間世界の上に天上世界（神々の世界）を想定します。私たちはともすると、天上世界を理想とするかもしれません。ここでは寿命ははるかに長く、願望として叶えられないものは何一つない、というのですから。しかしながら、天上世界にあったとしても、苦がなくなるわけではありません。嫉妬があり争いもあります。いつかは寿命も尽きます。快樂が大きいだけに、それが尽きる時の不安感はいかばかりでしょう。

人として生まれたからこそ真の幸福（菩提）を求めることができる、それは大いなる喜びにちがいありません。

inferaj suferoj estas nekompareble pli doloraj. Nia malkontento en la vivo faras la motivon forlasi la mondon. Nia malnobla koro estas la marko, ke ni deziras bodion. Tial ni estu ĝojaj, ke ni naskiĝis kiel homoj.”

La fakto, ke ni naskiĝis kiel homoj, estas treege mirinda. En la budhisma literaturo troviĝas unu parabolo pri blinda testudo kaj flosanta ligno. Laŭ ĝi, blinda testudo, kiu unu fojon en cent jaroj elakviĝas, hazarde enŝovas sian kapon en unusolan truon de flosanta ligno; la probableco de tiu ĉi okazo estas tiel malgranda kiel tiu de homa naskiĝo. (*Samyukta Āgama*, vol.3) “La Tri Rifuĝoj” ankaŭ diras, “Estas malfacile ricevi la homan korpon en tiu ĉi mondo, kaj tamen mi ja ricevis ĝin.”

Budhismo rakontas pri la transmigrado en la ses sferoj, inter kiuj la ĉiela mondo (de dioj) pli supera ol la homa mondo estas imagata. Ni emas pensi, ke la ĉiela mondo estas nia idealo, ĉar tie oni vivas ekstreme pli longe kaj niaj deziroj senescepte realiĝas. Sed eĉ en tiu mondo suferoj restas. Ankaŭ tie troviĝas ĵaluzoj kaj konfliktoj. La estuloj (dijoj) iam devas fini sian vivon. Ju pli grandaj estas plezuroj, des pli seriozaj estas maltrankvilaj sentoj, se konsideri la finon de la plezuro.

Ni naskiĝis kiel homo, ĝuste pro tio ni povas serĉi bodion, la veran feliĉon. Tio devas esti la granda ĝojo, kiel Genŝin diris.